

LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 7, nummer 3 (39) september-oktober 2014

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 7, n-ro 3 (39): septembro-oktobro 2014

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe [http://
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html).

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Karaj Gelegantoj,

*Estas kutimo ĉe ni komenci la novan labor-
jaron de Esperanto post la somerferioj. La
kluboj faras novan programon por la nova
laborjaro por ebligi siajn membrojn revidi
samideajn geamikojn kaj partopreni en la
klubprogramo, kiu celas pli ol ĉion alian doni
al la klubanoj la okazon (lerni) paroli nian
belan lingvon. Precipe por komencantoj tio tre
gravas, al kiuj mi diras : ne hezitu fari tiun
paŝon al via klubo kaj paroli la lingvon. Multaj
timas fari tiun paŝon, ĉar ili timas fari erarojn.
Sed tio estas tute normala kaj komprenebla.
Sufiĉas, ke oni komprenas vin. Tio estas stadio
kiun ĉiuj gelernantoj de fremda lingvo devas
trapasi. Ju pli ofte vi parolos la lingvon, des
pli rapide vi lernos korekte paroli ĝin. Cetere,
por kio vi sekvis kurson de Esperanto se ne por
paroli la lingvon kun gesamideanoj kaj amikoj
en- kaj eksterlande kaj korespondi kun ili ?*

*Tiu lasta aspekto estas unu el la plej agra-
blaj kaj interesaj, ĉar Esperanto estas kiel
pordo kiu malfermas al vi preskaŭ la tutan
mondon, ĉar la lingvo estas praktikata en
ĉirkaŭ 120 landoj. Laŭ la vortoj de d-ro Za-
menhof mem, Esperanto devas kontribui al la
forigo de "muroj de miljaroj kiuj staras inter la
popoloj dividitaj". Ĝi estas esence lingvo de
paco kaj interkompreniĝo por ĉiuj popolo, ideo
kiun ni trovas nun normala, sed kiu en la tem-
po de Zamenhof estis neaŭdita. Sed ankoraŭ
ĉiam ekzistas tiuj baroj en la mondo.*

Mi deziras al vi agrablan legadon !

Pieter Jan Doumen

Historio de Esperanto en Belgio (2)

(Geschiedenis van het Esperanto in België, 2)

2. La vera starto kaj unua ondo (1897-1900)

"Fine de 1897, mi ĝojegis estante elektita por
prepari unue, kondukadi poste, ekspedicion kiu

devos trairi tropikan Afrikon de la buŝo de
Zambezo al la enfluo de Kongo en la ocea-
non. La entrepreno estis tre grava kaj bezonis
mian tutan tempon. Meze de ĝiaj preparaĵoj
kaj tre diversaj laboroj, mi tute hazarde sciigis
pri la lingvo internacia Esperanto.

"Por mi kiel vojaĝisto la demando estis certe
interesa. Tamen, kiam mi petis libriston en
Parizo venigi esperantan lernolibron al mi, mi
tute ne povis suspekti, kian inspiraĵon tiu ĉi
libro estos alportanta al mi.



D-ro L.L. Zamenhof (1859-1917)

"Tiu vorton 'inspiraĵo' mi uzis intence, ĉar,
leginte la unuajn paĝojn de la dirita lernolibro,
mi tiel interesiĝis pri ĝi, ke, nefermante la
libron, mi ĝin tute kaj tuje tralegadis, kaj poste
mi skribis leteron Esperante, kiun mi sendis al
sinjoro de Beaufront. Lia respondo alvenis per
la revenanta kurieraĵo ; ĝin mi komprenis
perfekte. Mia opinio estis farita."

Tiel skribis en la unua numero de *La Belga
Sonorilo* en 1902 – la tridek-kvaraĝa entu-
ziasma afrika esploristo leŭtenanto Charles
Lemaire, honora membro de la Multlingva
Klubo de Bruselo (le Cercle Polyglotte de
Bruxelles), kiu vere enkondukis la internacian
helplingvon en nian landon.

Laŭ la franca kaj nederlanda tekstoj (ĉar *La
Belga Sonorilo* estas, almenaŭ parte, trilingva),
li "aŭdis paroli" pri la lingvo. Do verŝajne li ne
konatiĝis kun ĝi per iu el la artikoloj menciitaj
en la unua ĉapitro. En alia loko tamen ni legas,

ke li interesiĝis post legado de artikoleto en franca revuo

Li plue skribis en la artikolo, ke pli malfrue li sciiĝis pri kvar aŭ kvin belgaj silentaj esperantistoj. Sed nenie ni retrovis, krom Dethier, iun signon pri tiuj silentuloj.

La unuaj agoj de la nova esperantisto konsistis el du propagandaj paroladoj en la Multlingva Kluba (decembro 1897 kaj januaro 1898), kie la grandnombra aŭdantaro aplaŭdis la simpatian propagandiston.


Leŭtenanto Lemaire havis ankaŭ bonajn rilatojn kun la ĵurnalo *Le Petit Bleu*. Dum la sama periodo tiu ĉi brusela gazeto publikigis serion de ses propagandaj artikoloj, kiujn oni poste arigis en broŝureto, kiu, presita en miloj da ekzempleroj, estis disdonita en Belgio danke al la donacoj de sinjoro Somsée, Ernest Solvay, barono Lambert kaj aliaj. La ĵurnalo *Le Petit Bleu* estis tiam tre grava ĵurnalo, multe legata precipe en liberalaj medioj.

Kvankam la broŝureto aperis en pluraj miloj da ekzempleroj, ĝi nun fariĝis raraĵo. Eĉ la biblioteko de Kortrejko ne posedas ekzempleron. Unu ekzemplero troviĝas en la t.n. Albertina Biblioteko en Bruselo. La ok artikoloj aperis inter la 17-a de decembro 1897 kaj la 1-a de januaro 1898. Resumon de la artikoloj ni prizorgas en aparta ĉapitro.

Certe Charles Lemaire disvastigis ideon ankoraŭ novan por multaj. Li pravis kredante, ke li altiris kelkajn adeptojn al la lingvo, sed lia kontenteco fariĝis granda, kiam, mallonge post sia unua parolado, li eksciis, ke li konvertis malnovan profesoron de alia artefarita lingvo, nome de Volapük: s-ro Edmond Blanjean, kaj ke tiu nova adepto, post kelkaj horoj da lernado jam konis Esperanton, kaj plie ke li akceptis estri kurson de Esperanto en la Multlingva Klubo.

Ĵaŭdon, la 27-an de januaro 1898, ĉirkaŭ 80 personoj enskribis sin por tiu kurso ! Poste la nova instruisto organizis ankoraŭ kelkajn kursojn antaŭ la komenco de la lernejoj ferioj. Tio eblis, ĉar li opiniis, ke dek unuhoraj lecionoj plene sufiĉas por konigi Esperanton. De tiu momento Esperanto estis ĉiam instruata en la Multlingva Klubo, kaj inter la aŭdantoj troviĝis ne nur samlandanoj, sed ankaŭ angloj, germanoj, bulgarioj, rusino kaj armeno. Kelkaj el ili fariĝis sindonaj kaj ardaĵ esperantistoj, kiuj per siaj tutaj fortoj laboradis por la disvastigado de la lingvo.

Unu el la lernantoj estis s-ro François Roelandt, kiu en februaro aŭ marto 1898 starigis



malgrandan esperantistan grupon en Gilly apud Karloreĝo (tiam esperantigita al Ĵilio) kaj tie organizis kaj gvidis kurson. Preskaŭ certe ni devas konsideri tiun grupon kiel la unuan en nia lando... eĉ se ĝi ne longe estis aktiva. La grupo da Esperantistoj en la sino de la Multlingva Klubo ne estis vere organizita grupo.

En alia valona urbeto, Spa, s-ro Charles Hault gvidis la unuan esperantan lecionon en la Arta kaj Kultura Rondeto de Spa la 27-an de marto 1898.

Vendredon, la 29-an de aprilo 1898 Charles Lemaire devis forvojaĝi por scienca esplorado tra Mez-Afriko kaj Katanga, esperante, ke la movado en Belgio estis jam sufiĉe granda, kaj pensante, ke oni devas lasi ĝin libere evolui kaj kreski. Sed tiam kiel nun... kiam la motoro de la maŝino estas forprenita, ĉio baldaŭ mutas...

*Eriko D'Hondt kaj Petro De Smedt
(daŭrigota)*

3. Artikolo de Edm. Blanjean (aprilo 1898)

Kvankam ni de la pasinta januaro okupiĝadas pri la nova lingvo Esperanto, estas nur hodiaŭ, ke ni efektive konatiĝas kun la esperantistaro. Oni do permesu al ni, enirante en tiun familion da progresamaj homoj, da amantoj de l' homaro, adresi al ĉiu koran saluton kunfratan.

Ni estis dezirintaj skribi pli frue al la ĵurnalo por raporti pri la movado de Esperanto en Belgio, sed premegaj okupadoj ĝis nun malhelpadis al ni plenumi nian deziron. Ni tamen pensas, ke la amikoj ne plendos pri tiu malfruo, kiam ili estos tute legintaj nian leteron, ĉar tiu ĉi alportas bonegajn novaĵojn pri la estonteco de Esperanto en Belgujo, kaj ni kuraĝas tion diri en la tuta mondo.

Kiel oni legis en la februara numero de *Lingvo Internacia* ĉiamekzistanta kurso estis aranĝita ĉe la Brusela Poliglota Klubo. Ni komencis la unuan kurson la 27-an de la pasinta januaro, kaj donis la lastan lecionon la 31-an de marto. Trideko da gelernantoj ĉeestis tiun kurson ĝis la fino kaj estas nun kapablaj interŝanĝi korespondaĵojn kun fremdaj esperantistoj. Je la 21-a de la nuna monato malfermiĝos nova kurso, por kiu ni jam ricevis multajn demandojn por enskribiĝo. Estas do al ni permesite diri, ke Esperanto faradas grandajn progresojn en Bruselo, kaj ke la vastigado, tiel efike entreprenita de s-ro leŭtenanto Lemaire, donis feliĉajn kaj kuraĝigajn rezultatojn, ne sole por la belgaj adeptoj, sed ankaŭ por multaj alilandanoj.

Sed ne estas sole en la ĉefurbo de la lando ke la lingvo varbadas adeptojn; ĝi ankaŭ disvastiĝadas en la aliaj urboj, nome en Gilly (apud Karloreĝo) kaj en Spa. Unu el niaj plej bonaj lernantoj, s-ro Roelandt, ĵus fondis esperantistan rondeton en tiu unua urbo ekster Bruselo kaj donas tie kursojn ĉiudimanĉe. Ni konas la sindonemon kaj energion de nia amiko kaj estas certaj, ke danke al li la industria regiono de Karloreĝo baldaŭ kalkulos multajn esperantistojn. Ni esperas, ke, kiel li, multaj el liaj lernantoj fariĝos vastigantoj kaj instruistoj, kaj tiamaniere potence helpos por konigadi la novan lingvon kaj por plioftigi, plifaciligi kaj pliagrabligi la komunikadon inter la popoloj de la tero.

Nia legantaro vidas per tiuj sciigaĵoj, ke Belgujo, kiu dum longa tempo malrapidadis por aligi decide al nia afero, nun volas sin meti je la unua rango de la landoj, kiuj plej multe laboras por la prospero de la nova sistemo. La vojo trairita de la tago, kiam leŭtenanto Lemaire donis sian unuan paroladon, estas longega, kaj oni vidos pli malsupre, en kiaj favoraj kondiĉoj sin prezentas la estonta disvastiĝado, kiu, ni esperas tion el la tuta koro, havos tutmondan influadon.

Edmond Blanjean

Novajoj el Esperantolando

Nieuws uit Esperantoland

Brazilo 1 - Interesaj esperantlingvaj filmetoj

Fábio Monteiro estas profesia brazila ĵurnalistoj, kiu antaŭ nelonge iĝis esperantisto. En internaciaj Esperantaj rondoj li iĝis konata per sia jutuba videofilmeto "Karnavala Festo en Esperanto". Fábio lanĉis nun blogon, en kiu li anoncas la projekton *Globeto*, iuspeca interreta

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5
B-3940 Hechtel
Tel. 011-73.02.20
Fax 011-73.02.21
hechtel@kbc.be

televido, per kiu li intencas publikigi siajn Esperantajn filmetojn.

Tie troveblas jam okulfrape bona filmeto pri la pasintjara Tutamerika Kongreso de Esperanto, TAKE, okazinta en São Paulo. Fábio sprite kaj trafe prezentas la ĉefajn erojn de la Kongreso. La filmo, kiu havas du partojn, taŭgas por mem sola rigardi kaj ĝui ĝin, kaj por prezenti ĝin al lingvolernantoj kaj kursanoj por virtuale sperti etoson de Esperantaj aranĝoj.

La blogo kaj la filmoj estas troveblaj ĉe :
<http://fabinhomonteiro.com/2012/06/11/la-lancado-de-globeto/>

Ret-Info, Eventoj, Hungario

Brazilo 2 – Esperanto kiel laborlingvo

La Ministerio pri Turismo de Brazilo aprobis Esperanton kiel laborlingvon. Laura Pereira de Alcántara estas la unua brazila profesiulino, kiu aperigas la Esperanto-flagon sur sia nova identigilo de loka turisma gvidistino.

La *Indiana Cooperativa Grupo de las Indias* (Kooperativa Grupo de la Indianoj) estas transnacia kooperativa reto dediĉita al la kreado, scio, retoj, produktoj kaj servoj por la aŭtonomigo de homoj, komunumoj kaj organizaĵoj per pioniraj iloj, kiuj plibonigas la daŭrigeblon kaj resonon de iliaj projektoj.

Fondita en 2002, ĝi laboras nun en Latina Ameriko (Montevideo kaj Bonaero) kaj Eŭropo (Madrido kaj Bilbao). La plej fama grup-estra kooperativo estas la *Sociedad de la Indias Electrónicas*, kiu kreis diversajn novaĵojn, i.a. la unuan entreprenblogon en la mondo kun retservoj pri libera programaro. La plej granda enspezo de tiu societo havas sian originon en konsilado al diversaj grandaj organizaĵoj, fondaĵoj kaj registaroj pri organizado, teĥnologio kaj soci-ekonomika elvolvigado.

En la *Indiana Kuriero* Manuel Ortega skribas : "Interne nia lernado de Esperanto superbe kaj rapide progresas. Esperanto pli kaj pli estas la lingvo de la indianoj. Ni volas profiti de la okazo danki ĉiujn, kiuj diversmaniere alprenis la taskon diskonigi nian decidon ekuzi Esperanton kiel laborlingvon kaj ankaŭ tiujn kiuj gratulis nin. Jen Esperanto, sinteza lingvo, kiu estas, sendepende de nia origina kulturo, perfekte lernebla en unu ĝis du jaroj post intensa lernado. Por simila rezulto en natura lingvo ne malproksima de nia familia lingvo necesus pli ol dek jaroj. Tial antaŭ du semajnoj ni, indianoj, komencis studi kaj uzi Esperanton ĉe nia labortablo por debati kaj labori.

Henri Masson, Francio

Ĉinio – ILEI-konferenco kun altranguloj

La 45-a konferenco de la Internacia Ligo de la Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estis solene malfermita en Kunming en sud-okcidenta Ĉinio sabate la 21-an de julio. La inaŭguron ĉeestis senprecedenca kvanto da altrangaj oficialuloj. La konferenco okazis en la Profesia Artkolegio de Kunming kaj daŭris ĝis la 26-a de julio.

La solena malfermo de la 45-a Konferenco de ILEI esti sendube la plej impona en la liga historio, kun la plej altrangaj akceptantoj. Podie sidis naŭ solenuloj, kaj ses personoj alparolis la 300-kapan publikon...

Kompleta raporto kun fotoj haveblas de Stefan MacGill, prezidanto de ILEI


Henri Masson, Francio

Belgio – Jo Haazen, ordenita de la reĝo

En julio 2012 okaze de la belga nacia festtago reĝo Alberto II-a nomumis profesoron Jo Haazen *Komandoro en la Kronordeno*. Temas pri la fama flandra kariljonisto kaj la, ekde nelonge, nova prezidanto de la Flandra Esperanto-Ligo.

La juvelo de la ordeno konsistas el kruco kun kvin blanke emajlitaj brakoj kaj dek punktoj. En la blua centro troviĝas ora aŭ arĝenta krono. Sur la dorsflanko troviĝas la duobla L de Leopoldo II, kiu kreis la ordenon. Ĝi pendas de ruĝviola rubando, kiun oni metas trans la dekstran ŝultron, tiel ke ĝi pendas sur la maldekstra kokso.

Jo Haazen rajtas fieri pri sia ordeno kaj povis aldoni ĝin al la aliaj, kiujn li ricevis en la daŭro de la jaroj. En 1980 li ricevis en la Universitato de Kalifornio en Berkeley la dekoracion



Honors of Music. En 1995 li ricevis de la belga Ministro pri Eksterlandaj Aferoj la *Civitan Medalon de la Unua Klaso*. En 2000 li estas akceptita en la Eŭropa Honora Senato *Pro Pace et Unitate, e Meritu et Honoris Causa*. En 2004 Putin honoris lin per la rusa *Ordeno de la Amikeco* pro sia unika kontribuo al la revivigo de la muzikaj tradicioj en la fortreso Petro kaj Paŭlo en Sankt-Peterburgo, kiuj estis iniciatitaj de Petro la Granda. Li ankaŭ povis enpoŝigi la *Honoran Diplomon de Sankt-Peterburgo*. Unu jaron poste li ricevis en Luksemburgo la **Arĝentan Medalon** pro siaj gravaj aktivaj favoroj al Eŭropo. En 2009 li ricevis el la manoj de la guberniestro de Antverpeno la *Premion Christoffel Plantijn*. Kaj ankaŭ en 2012 li estis honorita per *Ora Dekoracio* pro sia rimarkinda kariero.

Ni tutkore gratulas nian prezidanton pro la granda honoro kiun li ricevis !

El 'Mechelen blog'

Hungario – Novaj libroj en la STEB

Lingvon oni lernas por uzi ĝin. La uzado en la sciencaj kaj profesiaj kampoj tamen postulas, krom entuziasmo, ankaŭ taŭgajn terminojn kaj fakajn esprimojn. Antaŭ ol verki iun ajn sciancajn aŭ fakajn artikolon, oni devas konatiĝi kun la jam ekzistantaj terminoj, fakaj esprimoj kaj parolturnoj.

Ĉe la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB) estas kolektataj esperantlingvaj teknikaj kaj natursciencaj artikoloj kaj elektronikaj libroj

Liston de la nove eldonitaj libroj ni publikigas de tempo al tempo en interretaj listoj kaj



pere de Ret-Info. Se vi konas sciencan aŭ teknikan verkon, ankoraŭ neregistritan ĉe STEB, ni akceptos kun danko vian informon pri ĝia reta trovadreso, aŭ rekte ĝian dosieron mem.

STEB estas funkciigata de Lingvo-Studio, LS, en la Esperanto-Centro Eventoj en Budapeŝto, kiu ne ricevas eksteran financon subtenon de landa asocio, nek de E@I aŭ ESF, nek de aliaj instancoj. La retadreso de STEB estas : <http://www.eventoj.hu/steb/> . Oficejaj kunlaborantoj estas : Szilvási László kaj Mészáros István, kontakteblaj ĉe oficejo@eventoj.hu .

Multan dankon al ĉiuj aktivuloj, helpantoj kaj kunaborantoj !

Szilvási László, Hungario

Nova flegado plifortigas la koron *(Nieuw behandeling versterkt het hart)*

Ĉe alta procento de gemaljunuloj en la Okcidento kor- kaj angimalsanoj estas la ĉefa kaŭzo de morto. En junio 2012 estis prezentitaj la rezultatoj de kvinjara esplorado en Kisa, malgranda vilaĝo en Svedio. Tiu esplorado, dum kiu la mineralo selenio kaj la koenzimo Q10 estis donataj kiel komplementa nutraĵo, montras duonigon de la kutima mortado pro kormalsanoj aŭ koratakoj.

"Ankaŭ ni mem estas vere surprizitaj," diris la gvidanto de la esplorado, P-ro D-ro Urban Alehagen, fama kardiologo de la universitato de Linköping en Svedio.

En la esplorado partoprenis 443 svedaj viroj kaj virinoj aĝantaj inter 70 kaj 88 jaroj, kiuj estis sufiĉe sanaj ĉe la komenco de la esplorado.

"Ni testis kombinon de du naturaj materioj, nome selenio kaj Q10. El la disponebla literaturo ni sciis, ke ili ludas rolon en la sano de la koro, sed ankoraŭ neniu ekzamenis la efikon

de la kombino de la du nutraĵoj," diris Urban Alehagen.


La volontuloj estis dividitaj en du grupojn. Unu grupo ricevis ĉiutage 200 µg da selenio kaj 200 mg da koenzimo Q10, kaj la alia grupo placebon. Proksimume la duono de la volontuloj fidele englutis dum kvin jaroj la pastelojn kaj iris dufoje jare al malsanulejo por esti ekzamenataj.

Aperis, ke 12,6% de la placebogrupanoj mortis pro kardiovaskulara malsano en la daŭro de la esplorado. Tio procento estis nur 5,9% en la grupo kiu ricevis selenion kaj la koenzimon Q10.

Mezurado de la premo sur la korvando (NT-proBNP) montris, ke ĝi estis signife pli malalta ĉe la grupo kiu prenis selenio kaj la koenzimon Q10. El la eĥokardiografio ankaŭ aperis, ke la pumpfunkcio kaj la ejekcifrakcio estis multe pli bonaj ol en la placebogrupano. La nova flegadmaniero simple plifortigis ilian koron.

La koenzimo Q10 gravas por la energiprovizo de la ĉeloj, inter kiuj tiuj de la koro. Pluraj esploroj estis farataj en la pasinteco ĉe homoj kun kormalsanoj per tiu vitamineca materio, kiu ĝenerale donis bonajn rezultatojn. Ĝia titro ofte plimalaltiĝas, kiam oni maljuniĝas. Ankaŭ statinoj – la kuraciloj kiuj plimalaltigas la kolesteroltitron – plimalaltigas la titron de la koenzimo Q10. Multaj el la personoj kiuj partoprenis en tiu eksperimento, glutis tiujn kuracilojn.

Jam en la pasinteco oni relatigis kor- kaj angimalsanojn al manko de la mineralo selenio. Unu el la multaj funkcioj de tiu mineralo estas tiu de konstrumaterialo de la proteino TrxR1, kiu gravas por la metabolismo de la koenzimo Q10. La titroj de selenio en Svedio



estas malaltaj. Tio instigis sciencistojn de la universitatoj de Linköping kaj Karolinska uzi ambaŭ dum sia esplorado. Ke la pozitiva efiko estis tiel granda, superis iliajn plej temerarajn atendojn. *K. De Smedt (Maar natuurlijk)*

La virino kiu famigis van Gogh *(De vrouw die van Gogh beroemd maakte)*

Vizitantoj de muzeoj en la tuta mondo staras antaŭ liaj pentraĵoj de sud-francaj pejzaĝoj aŭ liaj famaj sunfloroj.

La historio de la mondvasta famo de Vincent van Gogh komenciĝas per tragika evento. La pentristo, kiu naskiĝas en 1853 en la nederlanda Nunen, mortigas sin en sia loĝejo en Sud-Francio la 29-an de julio 1890. Por lia pli juna frato Theo tio estas forta ŝoko.



Jekdu Sunfloroj":
ma pentraĵo de
Vincent van Gogh

Theo vivas en Parizo kiel artkomercisto. Ĉiunmonate li sendas al sia frato Vincent koverton kun 150 frankoj. Lia edzino estas la nederlandano Johana Bongers. Ŝian vivhistorion skribis la argentina aŭtoro Camilo Sánchez en interesa romano, en kiu li detale priskribas la vivon kaj sinmortigon de Vincent kaj la tragikan kadukiĝon de ŝia edzo, Theo, kiu ne povis digesti la morton de sia frato. Ses monatoj post la morto de Vincent mortas ankaŭ lia frato Theo sekve de sifiliso en la nederlanda urbo Utreĥto, kien lia edzino transportigis lin.

Sed Johana vivas. Ŝi devas vivi, ĉar ŝi havas infanon de Theo, la malgrandan Vincent. El

Parizo ŝi kunprenas kelkajn pentraĵojn de sia bofrato al Utreĥto kaj ties leterojn al Theo. Ju pli ŝi enprofundiĝas en la leterojn de la pentristo, des pli klare ŝi vidas sian taskon : ŝi okupiĝos pri la verkado de sia mortinta bofrato kaj protektos lin kontraŭ forgeso. Kiel heredantino ŝi pretendas la posedon de la pentraĵoj de Vincent kaj malfermas pensionon. La muroj de ĉiuj ĉambroj estas baldaŭ ornamitaj de la pentraĵoj de Vincent, kiuj vekas la intereson de la gastoj. Tio kuraĝigas Johana, malgraŭ la negativaj kritikoj dum la unuaj ekspozicioj.

Ŝia patro estas skeptika : "Ĉu vi ne kredas, ke oni prefere hejtigus la fornon per tiuj bildoj ?"

Sed Johana ne konfuziĝas pro tio, trovas aliancinojn inter kritikistoj kaj artkomercistoj, ŝparas monon por enkadrigi la pentraĵojn de Vincent, vendas kelkajn bildojn, gardas aliajn kaj havas sukceson. La historio de "La vidvino de la frato de Vincent Van Gogh", kiu baldaŭ aperas, estas pli ol romano pri nekonata, malriĉa pentristo. Ĝi estas farita el la materio, el kiu oni faras hollywoodajn filmojn. Estas la historio de obstina, forta virino, al kiu ni dankas la "Sunflorojn" kaj la "Semiston". Fine, la vendo de la "Sunflorojn" estas la komenco de la mondvasta sukceso de la pentristo.

Walter Keller (el 'Blick')

Neferteta , la bela egipta reĝino (2) *(Nefertete, de mooie Egyptische koningin (2))*


3. La donacoj de la faraono

Amenotepo la III-a estis la filo de la Amenotepo II-a kaj konkubino. La fama Haŝepsuta, fratino kaj granda reĝa edzino de Amenotepo la II-a, regis kiel faraono anstataŭ sia multe pli juna kaj nekapabla edzo, sed ŝi ne havis filon.

Al Amenotepo la III-a oni povas riproĉi multon, sed ne ke li neglektis siajn multajn edzinojn. En la somero de 1391 a.K. Teja, lia Granda Reĝa Edzino – la aliaj estis nur senrajtaj konkubinoj – sentis sin grave ofendita, ĉar la pastroj de Amono ne invitis ŝin por ludi la rolon de la diino Muta sur la sankta lago dum ceremonia festo. Por malfari tiun ofendon, ŝi petis la faraonon donaci al ŝi ludlagon por povi amuzi sin kiam ŝi estis sola. La faraono ne prokrastis la plenumon de tiu peto, sed tuj kolektis siajn 250.000 laboristojn, kiuj laboris pri diversaj grandaj projektoj en la urbo kaj igis ilin fosi lagon de 2,6 km je 420 m oriente de la palaco en du semajnoj. Li mem inaŭguris la lagon, remigante ŝin sur ĝi en sia reĝa barko.

Fosante tiun lagon, la laboristoj faris plurajn montetojn, sur kiuj Amenotepo plantigis maloftajn arbojn kaj plantojn.

Stranga estas la nomo de la reĝa barko 'Atono brilas'. La dio Atono jam longe estis adorata en Egiptio. Ĉi tie unufoje aperas Atono kiel la plej alta dio, kies simbolo estis la suno. Regimento de la armeo portis lian nomon, kiun oni ankaŭ trovas sur monumentoj. Juĵo kaj lia edzino Tuja, la gepatroj de Teja, plivigliĝis la kulton de Atono, kiun poste ilia filo Aĥnatono deklaris la solan dion de Egiptio, malpermesante la kulton de Amon kaj de la aliaj gedioj. Juĵa, malgraŭ tio ke li ne estis vera egipto, fariĝis la granda viziro de la faraono kaj ricevis la titolon de 'patro de la faraono'. Post lia morto li estis entombigita en la Valo de Reĝoj inter la reĝoj.



La nomo Atono multe similas al "adonaj" (sinjoro), kiun uzis la hebreoj, la unika mono-teisma popolo tiutempe, kiuj restadis en Egiptio, ĉar ili ne kuraĝis prononci la vorton Javeo, la nomon de sia unika Dio. Ne hazarde la faraono konstruis novan palacon en Djaruĥa trans Nilon, tial ke ĝi estis separita de la palaco de Tebo, la temploj de Amon kaj precipe de la pastroj de Amon, kiuj havis tro da potenco.

Tiu nova palaco nomiĝis "Domo de Ne-Maat-Re, t.e. belega brilo de Atono, nomo kiu poste ankaŭ ricevis la residejo de Amarno. Pli malfrue li renomis ĝin 'Domo de Jubilado'. Poste ankaŭ la templo de Atono en Amarno ricevis tiun nomon. Malgraŭ lia konflikto kun la pastroj de Amon, tiu dio tute ne estis morta por la faraono. Li pligrandigis la templon de Amon en Karnako kaj aldonis al ĝi trian pilonon (pordegon), ornamitan per oro kaj gemoj. Li montris, ke li honoras ambaŭ diojn, kiam en la 5-a jaro de sia regado li neniigis ribelajn tribojn laŭ ordono de Amon kaj Atono.

4. La Festo de Opet

Oni komencis ĉiun jaron per granda festo honore al Amon: la festo de Opet. Tiam la faraono iris kun sia sekvantaro de la templo de Karnako al la "suda haremo", la templo de Luksoro.

Nuboj da incenso ŝvebis tra la plejsanktejo de la templo de Karnako, kie la faraono prezentis al Amon, lia edzino Muta kaj ilia filo Ĥonso manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, dum resonis la sublimaj sonoj, produktitaj de la duonnudaj templomuzikistinoj. Laodoro de la incenso miksiĝis kun la forta fetoro de la brulanta graso de elektitaj virbovoj kaj virŝafoj, kiu gutis en la alte flamantan oferfajron.

La faraono volis montri sian novan edzinon al la popolo, kaj Tudaĉepa devis paŝi en la granda festprocesion kune kun Teja malantaŭ la dua sunbarko. La homoj de Tebo, impemaj de ĉio bela, admiris la principinon el Mitanio ekde la rando de la larĝa Virŝafa Aleo kaj nomis ŝin Nofret-ete, "La belulino venis."

La festa procesio estis kondukata de trumpetisto, kiu sendis siajn blekantajn tonojn en la bluan ĉielon kune kun la tamburistoj. Post ili paŝis viro kun granda ora vazo, en kiu subbrulis bonodora incenso. Lin sekvis la ĉefpastro, tute senharigita kaj nuda, escepte por lumbovesto el haŭto de leopardo. Tiam venis la barkoj de la sundio kaj du aliaj ŝipoj. La tri barkoj de Amon, ties edzino Muta kaj ilia filo Ĥonso troviĝis dum la resto de la jaro sur difinita loko en la templo. Ili ripozis sur arte hakitaj ŝtonaj trapezformaj sokloj. Kie normale troviĝis la loko de la stiristo, staris luksa kesto kiu kaŝis ĉirkaŭ metro altan lignan distatuon. Super la kesto pendis vualoj. La barkoj ne estis kutimaj navigiloj, sed tre arte konstruitaj ŝipoj. La ceremonioj, kiuj estis partoj de la sunadorado de Heliopoliso, esprimis la kredon, ke la sundio veturas laŭlonge de la brila ĉielo kaj nokte igis

sin remi tra la subtera mondo. El la ŝipvando elstaris ambaŭflanke horizontaj stangoj, tiel ke 24 pastroj povis porti tian ŝipon, ĉirkaŭitaj de du portantoj de enormaj, altvaloraj plumaj ventumiloj apud la pruo kaj la poŭpo, kaj po du pastroj ĉe la babordo kaj la tribordo.

Amenotepo paŝis post la barko de la sundio, dum la Granda Reĝa Edzino paŝis malantaŭ la barko de Muta. La popolo montris multe malpli da intereso por la procesio, ol por la bela blanka kaj roza juna princino el Mitanio, kiu paŝis flanke de la sunbrunigita kvindekjara Granda Reĝa Edzino Teja.

La memfida reĝino Teja ne vidis konkuranton en Neferteta, kaj ne enfermis ŝin en la reĝa haremo, kion ŝi jam faris per la multaj aliaj edzinoj de la faraono, sed gardis ŝin apud ŝi. Estis klare, ke la bela juna princino multe plaĉis al ŝi. Verŝajne ŝi rigardis ŝin kiel la filinon, kiun ŝi ne havis.

Oni povas serioze pridubi, ĉu la maljuna kaj malsana Amenotepo iam dividis sian liton kun Neferteta, ĉar Teja restis oficiale "lia sola amata granda reĝa edzino", kiu tute dominis sian edzon. Ekde la 10-a jaro de lia regado neniu politika aktivaĵo de la pigra bonvivanto Amenotepo estas konata. Li ne plu montris intereson por sporto kaj ankoraŭ malpli por milito. Estas certa, ke ekde 1366 a.K., kiam la sanstato de la reĝo estis multe malboniĝinta, Teja tenis en siaj manoj la absolutan potencon. Tion pruvas la leteroj kiujn Tusrato, la patro de Neferteta, skribis al la reĝino tuj post la morto de la reĝo. Malgraŭ sia juna aĝo de 15 jaroj "la belulino venis" estis tre memfida kaj inteligenta juna virino. Sed, ĉu ŝi volis aŭ ne, ŝi devis akcepti ĉiujn proponojn de Teja.

La tebanoj vivis monogame kiel ĉiuj Egiptanoj. La dommastrino estis la sola laŭleĝa edzino. Se viro deziris alia(j)n virino(j)n, li prenis konkubino(j)n, kiu(j) havis neniajn rajtojn kaj kiujn li plej ofte elektis el la ordinara popolo. Belaj knabinoj ofte uzis sian brilan junecon por supreniri sociale per edziniĝo kun riĉa artisto-krata viro.

5. La rita seksuniĝo

Ĝis la tempo de Amenotepo la III-a la diedzino, t.e. la reĝino, estis ankaŭ la Unua de la 'Haremvirinoj de Amono', t.e. de la pastrinoj. En ĉambro flanke de la plejsanktejo de la templo de Luksoro kaj la templo de Hasjepsuta en Der-el-Bahari oni povas vidi bildojn de la koncipoj kaj la naskiĝo de faraonoj, en kiuj iuj egiptologoj vidas specon de kulta kopulacio.



Laŭ tiuj sciencistoj la unuigo de la dia faraono kun la diedzino okazis dum tiu ĉiujara Festo de Opet, dum la popolo dancadis kaj kantadis ekster la pordegoj de la templo.

Oni povas suspekti, ke tia generprovo, almenaŭ se la malsana Amenotepo la III-a ankoraŭ entreprenis ĝin, devis esti terura ŝoko por la kvindekjara Neferteta kaj certe negative influis sian sintenon kontraŭ la religio de Amono.

La pastroj-skribistoj de la Nova Regno pri-skribis, kiel okazis tia rita seksuniĝo.

"Tiu rava dio Amono, la reganto de la Tronoj de Ambaŭ Landoj, venis post kiam li alprenis la aspekton de Lia Moŝto ŝia Edzo, la reĝo de Supra Egiptio kaj Malsupra Egiptio. Li trovis ŝin, dum ŝi dormis en sia bela palaco. Ŝi vekigis per la aromo de la dio kaj ridis en la ĉeesto de Lia Moŝto. Li venis rekte al ŝi, ekflamis por ŝi kaj donacis al ŝi sian koron. Li lasis ŝin spekti lin en sia dia formo, kiam li staris antaŭ ŝi. Ŝi ĝojis, kiam ŝi admiris lian belecon, kaj amo trafluis ŝian korpon. Laodoro de la dio disvastiĝis en la palaco, ĉiuj liaj odoroj estis kiaj tiuj de la lando Punto. Tiam la dia Moŝto faris al ŝi kion li deziris, kaj ŝi lasis lin ĝoji."

Sed ne nur la gedioj havis kaŭzon ĝoji sin, ankaŭ al la popolo mankis nenio. La temploj havis provizoĉambroj, kiuj en tago kia tiu ĉi malfermis siajn pordojn kaj al ĉiuj permesis manĝi kaj trinki. Multaj petolaj orgioj okazis en la templo dum la festo de Opet. La tutan tagon oni dancis, manĝis kaj trinkis, kiel teba enskribo mencias: "La dioj de la ĉielo kantas pro ĝojo, la hatoroj, muzikantaj pastrinoj de la diino Hatora, batas sur siajn tamburetojn, la loĝantaj estas ebriaj pro vino kaj portas florkronojn sur siaj kapoj. La teamo de la remistoj gaje promenas tien kaj reen, unktitaj per la plej altvalora oleo."

Karaj Gesamideanoj,

Por mastri lingvon ne sufiĉas sekvi kursojn de tiu lingvo. Oni devas ne nur paroli ĝin sed ankaŭ multe legi ĝin. Tio validas ankaŭ por Esperanto, kvankam ĝia mastrado okazas multe pli rapide. Tial mi tra-dukis en Esperanton en la daŭro de la jaroj por vi dekon da interesaj libroj. Ili troviĝas sur la Espe-ranto-forumo, kies ligo vi trovas en la kolofono supre de la dua paĝo de La Ponto. Jen la titoloj de tiuj libroj, iliaj aŭtoroj kaj la nombro de la paĝoj. Mi esperas, ke vi profitas de la ebleco povi elŝuti kelkajn aŭ ĉiujn librojn. Ili estas tajpitaj en du kolonoj sur paĝoj de la formato A4 (kiel La Ponto). Mi ankaŭ pretas sendi ilin al vi se vi havas e-legilon. Pieter Jan Doumen.

"La Foino", novelo de Ernest Claes, 16 paĝoj

"La Filino de la Kapitano", romano de Aleksandro Puŝkin, 48 paĝoj

"La alarmsonorilo", romano de Aster Berkhof, 54 paĝoj

"Imperiestra Moŝto", romano de Louis Couperus : unua parto: 50 paĝoj ; dua parto : 62 paĝoj

"Soldato de Napoleono", romano de Erckmann-Chatrion en du partoj : "Konskripto de 1813", 72 paĝoj, kaj "Waterloo", 82 paĝoj

"Everard t'Serclaes", romano de Hendrik Conscience, 82 paĝoj

"Maria Walewska", romano de Octave Aubry, 88 paĝoj

6. Neferteta vekigis en odoro de mirho

Por la bela princino la tago komenciĝis jam tre frue, tuj kiam la suno leviĝis. Tio estas same memkomprenebla kiel la fakto, ke oni enlitiĝis tuj post la sunsubiro. Ŝi vekigis en odoro de freŝa mirho ĉe la sonoj de virina orkestro. Servistino, kiu devis atenti pri la momento kiam Neferteta malfermis siajn okulojn, tuj fortiris la velaspektan tukon de antaŭ la fenestro de la vasta dormoĉambro por enlasi la unuajn orajn radiojn de Amono. Neferteta dormis sola en la lito.

Kompare al normalaj hodiaŭaj konceptoj, la lito estis mallarĝa kaj mallonga kaj ornamita per belegaj inkrustaĵoj de metalo, duongemoj kaj pluraj specoj de ligno. La kaprohara matraco estis kovrita per tuko el fajna blanka linajo. Alia lina tuko servis kiel kovrilo, sed ĝi servis pli por protekti ŝin kontraŭ majestatencaj muŝoj ol kontraŭ malvarmo. Ŝi dormis nuda.

Flankĉambro servis kiel vestejo. Grupo de servistinoj atendis tie, por ĉiu ago unu servistino. Unu servistino helpis ŝin elekti la vestaĵojn por tiu tago, dua donis al ŝi la deziratajn sandalojn, tria transdonis al ŝi la kolĉenon, kvara la kapornamon, kvina la kronon – akmenaŭ se Neferteta ne preferis resti nuda, kio estis tute normala en la alta societo. Nur metiistoj, kampuloj kaj laboristoj, kiuj devis labori ekstere, ĉiam vestis sin.

Post la ellitiĝo ŝi banis sin en sia propra banujo. Tio ne estis superflua lukso en Egiptio. Eĉ la malriĉuloj banis sin almenaŭ dufoje tage, plej ofte en la refreŝiga Nilo.

(Daŭrigota)

Programo de LEA por 2014-2015

Jaŭdon, la 25-an de septembro 2014:

An Olijslagers gvidos skrabloludon.

Jaŭdon, la 30-an de oktobro 2014:

Ben Indestege organizos vesperpromenon

Ni kunvenos ĉe lia domo, Gaspeldoornstraat 23, Dilsen-Lanklaar je la 20h00.

Jaŭdon, la 27-an novembro 2014:

Henri Schutters gvidos kvizon.

Jaŭdon, la 11-an de decembro 2014:

Zamenhoffesto en "Onder de Toren"

Jaŭdon, 29-an de januaro 2015:

Prelego pri Neferteta far Jan Doumen

Jaŭdon, la 26-an de februaro 2015 :

Tradukado de kantoj en Esperanto.

Jaŭdon, la 26-an de marto 2015

Prelego far Henri Schutters.

Jaŭdon, la 30-an de aprilo 2015:

Kantovespero akompanata de Paul

Jaŭdon, la 28-an de majo 2015:

Paul gvidos promenadon tra "de Wulp".

Jaŭdon, la 25-an de junio 2015

Petanko ĉe Jan Doumen

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
Historio de Esperanto en Belgio (2) (*E. D’Hondt kaj P. De Smedt*)
- Paĝo 4: Novaĵoj el Esperantolando:
- Brazilo 1: Interesaj esperantlingvaj filmetoj (*Ret-Info, Hungario*)
- Brazilo 2: Esperanto rekonita kiel laborlingvo (*Henri Masson, Francio*)
- Paĝo 5: - Ĉinio: ILEI-konferenco kun altranguloj (*Henri Masson, Francio*)
- Hungario: Novaj libroj en la STEB (*Szilvási László*)
- Paĝo 6: Nova flegado plifortigas la koron (*K. De Smedt, Maar natuurlijk!*)
- Paĝo 7: Neferteta, la bela egipta reĝino (2) (*Philipp Vandenberg*)
- Paĝo 10: Downloadbare boeken vertaald in het Esperanto
Programo de Limburga Esperanto-Asocio por 2014-2015

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supranacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratan solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatika heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. “Autant de langues on parle, autant de fois on est homme,” a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.